

Kristiano Morgenŝterno: Pendumilaj Lidoj. Trad. Rikardo Ŝulco. - *Bleicher Verlag, D-7016 Gerlingen, 1980.*

Kristiano Morgenŝterno: Palmŝtrojmo. Trad. Rikardo Ŝulco. - Esperanto-Centro. *D-4790 Paderborn, 1983*

Felicitino Kukuko - Rikardo Ŝulco - Ernesto Ŝomero: *Die Posaunen von Jericho / La trombonoj de Jeriko.* Dulingva eldono. - Esperanto-Centro, *D-4790 Paderborn, 1984.*

Rikardo Ŝulco: Vespero jam fariĝis. Agregajoj kaj robajoj. - Esperanto-Centro. *D-4790 Paderborn, 1985* (aperigota).

Vestfaliaj Flugfolioj. - Responda eldonisto: R. Ŝulco.

Noto de la redaktoro

Rikardo Ŝulco plenrajte riproĉetas, ke la prezentita traktaĵo ne fontis el lia propra iniciato, sed el "invito". Fakte li — pro sia komplezemo — ne kuraĝis rifuzi mian peton. Bonŝance; pri esperantigo de la germanaj onomastikaĵoj li ja estas fama spertulo, kies opiniojn oni konsideru precipe en la sfero beletra, sed ankaŭ ekster ĝi.

Kiom koncernas la sferon de sciencaj nomenklaturetoj, oni inklinas pli eble al kompromisoj inter la grafismo kaj fonetismo. La klara tendenco de nia aŭtoro al "prononcismaj" solvoj fojfoje kolizias kun internacia terminologia praktiko.

Ekz. la diftongo EŬ, kvankam ne germana, tamen estas vaste internacia. Jen kial en Esperanto akceptiĝis Eŭropo, ne "Ojropo" laŭ la germana, "Eropo" laŭ la franca, "Evropo" laŭ la ĉeĥa, "Jevropo" laŭ la rusa prononcoj. Simile do Eŭgeno, freŭdismo k.t.p.

Analoge la germana *EI* fariĝas en Esperanto EJ, ne AJ (Rejno, Ejnŝtejno, -hejmo). Cetere, kvankam mi absolute ne kompetentas enmiksiĝi en la germanan ortoepion, mi klare aŭdis el pluraj germanaj buŝoj siaspecan sonon inter AJ kaj EJ en la vortoj skribitaj per *EI*. Krome, mi legis en *Etymologisches Wörterbuch der deutschen Sprache* (F. Kluge 1910), ke la numeralo *ein* oldsakse sonis *ên* (kp. la nederlandan *een*).

La tutmonda publiko perceptas prefere grafismon ol fonetismon. Tiom pli eble la principo validas por la publikoj esperantista kaj sciencista.

La beletristo Ŝulco kredas, ke la venonta lingvoevoluo serĉos kaj trovos taŭgajn solvojn. Fakuloj okupiĝantaj pri lingvonormigado eble deziros iomete modifi tiun ĉi tolereman tezon. Mi invitas precipe germanojn, ke ili kontribuu per siaj opinioj, kiujn mi volonte publikigos en proksima esperantologia kajero de SR.

J. Kavka

Problemoj de esperantigo de nederland- (lingv)aj loknomoj

Wouter F. Pilger (Nederlando)*

1. Ĝeneralajoj

1.1. Enkonduko

Kiel elokvente montrite de *Kavka* (1978, 1980, 1981), ekzistas okazoj, kiam loknomoj en internacilingva teksto devas ekhavi internacilingvan formon. Mi nur aldonu, ke plejmulta edama fromaĝo ne devenas de *Edam*, ke lejdena botelo ne estas botelo el *Leiden*. Kaj ke mastriĥta kalkoŝtono troviĝas ankaŭ ĉe *Valkenburg*. Esprimoj kiaj: "la fromaĝo de *Edam* de *Hoorn* malpli bone gustas ol la fromaĝo de *Edam* de *Schagen*" aŭ "La kalkoŝtono de *Maastricht* de *Valkenburg*" estas neakcepteblaj. Formoj kiel "*Maastricht-a*" kaj "*Leiden-a*" povas sufiĉi optike, sed ili estas neproneceblaj. Ne nur ĉar scio pri la nederlandaj ortografio kaj prononco mankas, sed ankaŭ ĉar la ŝanĝita vortakcento ofte simple malebligas la originan prononcon. Pro la fonetikaj proprajoj de la nederlanda lingvo, esperantigo de nederlandlingvaj loknomoj estas multe pli komplika ol tiu de, ekz. ĉeĥaj. Tamen pluraj esperantigitaj loknomoj estas uzataj, kaj el tiuj oni povas dedukti manierojn por taŭga esperantigo de pluaj nomoj de lokoj en Nederlando kaj nederlandlingva Belgio (alivorte: Flandrio).

Ekzistas diverskiala kontraŭstaro pri asimilado de (lok)nomoj. Kutime ne pri fremdlandaj, sed ĉefe pri "sialandaj" nomoj. Tamen oni konsideru la bezonojn de alilandaj personoj dezirantaj priparoli ankaŭ nederlandajn kaj flandrajn specialaĵojn! Instrui al ili la prononcon de la nederlanda (... kaj almenaŭ kelkcent aliaj lingvoj - ĉar tio estas la konsekvenco de kontraŭasimilismo, ekz. *Seppik* 1974), ne havas sencon. Havigi al ili imagon pri la nomoj en la kadroj de la Esperanto-fonetiko, laŭ mi estas la plej bona solvo.

* Redaktoro en eldonejo de lernolibroj, *Leeckerhoek 26, NL-82223 25 LELYSTAD.*

1.2. La “perfekta asimilaĵo”

La perfekta asimilaĵo plenumus ĉiujn ĉi tiujn kondiĉojn:

- ĝi estus laŭ aŭdo rekonebla por iu, kiu konas la originan sonon;
- ĝi estus laŭ vido rekonebla por iu, konas la originan skribon;
- ĝi estus trovebla en registro, kiu aplikas la originan skribon;
- ĝi flue enirus la ĉirkaŭantan lingvaĵon.

Kiel vi vidos, ĉi tiuj kondiĉoj ofte malebligas unu la alian. Sed eble konsolu nin, ke *Fr: Bois-le-Duc* por *'s-Hertogenbosch* kaj *En: Flushing* por *Vlissingen* plenumas nur la lastan kondiĉon.

Atentigo: La asimilaĵoj, pri kiuj ĉi tie temas, ne estas t.n. “ekzonimoj” (neenlandaj nomoj). “Varsovio” estas “ekzonimo” por la pola ĉefurbo *Warszawa*, dum “Varŝavo” estus asimilaĵo. Temas do pri necesa adapto de “endonimoj” (enlandaj nomoj) por difinitaj celoj. Estus ja strange, se nur nederlandanoj rajtus formi adjektivon de *'s-Gravenhage* el radiko “hag” -aŭ, pli laŭvere, se ĉiuj krom Esperanto-parolantoj rajtus fari tion!

1.3. Eĉ tiuj, kiuj kontraŭas asimilaĵojn, uzas ilin

Ekzistas homoj, kiuj kontraŭas la uzadon de asimilitaj nomformoj. Foje eĉ se temas pri tiaj tradiciaĵoj kiel Berlino, Parizo, Londono, Hago. Ili ne iras al Parizo, sed al *Paris* ne al Londono, sed al *London*.

Sed eĉ tiuj devas foje preparoli la lokajn enloĝantojn, kaj pli speciale la lokajn esperantistojn. Do ili parolas pri *Paris*-anoj, *Berlin*-anoj, *London*-anoj, k.t.p. kaj ili pensas, ke ili parolas pri *Paris*-aj, *Berlin*-aj, *London*-aj esperantistoj.

Tiel ekzistas ankaŭ nederlandanoj, kiuj parolas pri *Haarlem*-anoj, *Leiden*-anoj, *Alkmaar*-anoj. Kaj danoj, kiuj parolas pri *Odense*-anoj, germanoj kiuj parolas pri *München*-anoj. Bone kaj bele. Sed kio okazas, kiam ili preparolas la tieajn esperantistojn?

Kiam oni uzas vorton el unu lingvo en kunteksto alilingva, la prononco kutime ne estas identa al tiu en la origina lingvo.

Simple “la buŝo staras alie”. Angla vorto en franclingva teksto, franca vorto en anglalingva teksto, sonas alie ol en propralingva ĉirkaŭaĵo. Tio kompreneble ankaŭ okazas, kiam oni parolas esperantlingve. Sed tio ne jam signifas asimiladon. La originaj loknomoj en... -ano povas soni ankoraŭ sufiĉe “nacilingve” ĉar la akcento de “ano” troviĝas ekster la nacilingva ci-

taĵo. Sed, se oni diras (aŭ provas diri) ...-a, la akcento devas troviĝi sur la silabo antaŭ tiu -a. Sed tiu apartenas al la nacilingva citaĵo, kaj en ĝi eble estas eĉ vokalo kiu tiulingve neniam povas havi akcenton! Aŭ kiu almenaŭ en la citita vorto ne havas akcenton.

Ankaŭ aliaj influoj okazas: ekz. en *Fr*, vokalo havas influon al certaj antaŭantaj fenomenoj. Ĉu la -a en *Paris*-a aŭ *Bordeaux*-a ne kaŭzus prononcon de z antaŭ tiu a? Hiato en *Fr* ja ne estas akceptebla. Nu, kio estas la diferenco inter *Bordeaux*-za kaj Bordoza? Kio estas la diferenco inter *Paris*-za kaj Pariza? Se iu franco prononcas *Paris* per ĥ anstataŭ r, tio verŝajne ankaŭ estas lia prononco de r en Esperanto. (Ne senkaŭze Akademio faris specialan decidon pri rĥ!).

Konsentite, ne eblas aŭdi diferencon inter *Berlin*-a kaj Berlina. Sed, se oni provas diri *Leiden*-a, oni devas akcenti je la -en-finaĵo, kiu en la nederlanda enhavas ŝvaon (“neartikulaciita vokalaĵo”), kiu ne povas havi akcenton. Do, oni prononcas per esperanta e-sono. Do, oni ne diras *Leiden*-a, sed Lejdena.

Kiu diras *München*-a, same devos e-igi la ŝvaon. Sed tiu povas tamen konservi la ŭ-sonon kaj la “alian ĥ”. Tiukaze oni do ne dirus *München*-a, sed *Münch*-ena... Ne tiel dezirinda hibridaĵo.

Por reveni al la nederlanda: Se oni provas diri *Alkmaar*-a, pro la frazoĉirkaŭaĵo la du malsamaj a-sonoj “pli esperantiĝas”; la akcento transiras de la unua al la dua silabo (kaj ankaŭ tio ŝanĝas la kvaliton de la a-sonoj); rezulte oni ne diras *Alkmaar*-a, sed Alkmara.

2. Prononco kaj skribo

2.1. Iom da nederlandlingva fonetiko

Eble frapis vian atenton la duoble skribitaj vokaloj kaj konsonantoj en la nederlanda. Ili estas parto de la artifiko, per kiu oni sukcesas skribi 15-on da “puraj vokaloj” per kvin literoj. En la nederlanda, oni distingas t.n. “longajn” kaj “mallongajn” vokalojn, kies esenca diferenco ne estas daŭro, sed kvalito. En *IFA*-alfabeto: [a, a, e, ε, i, ɪ, o, ɔ, ø, y, u, ə] (plus deviaĵoj antaŭ r), eble pli facile reprezentemaj per: (á, à, é, é, í, ì, ó, ò, ó, ò, ú, ú, ë). La “mallongaj” *aeiou* (àèìòò) ekzistas nur en silaboj “fermitaj” (per konsonanto); se necese, oni fermas la silabon per duobligo de la konsonanto, kies prononco tamen restas unuobla. En la fino de silabo, la unuoblaj *aeou* indikas principe (áéóú), kaj tiujn sonojn en “fermita” silabo indikas duobla vokalsigno. (*grote* = granda kaj *grootte* = grandeco same prononciĝas!) (*i*) skri-

biĝas *ie*, (*ó*) *eu*, (*ú*) *oe*, (*ë*) plejofte *e*.

El tiuj vokaloj, (*à*, *â*, *é*, *è*, *í*, *ó*, *ò*, *ù*) estas “akcepteblaj” en Esperanto, almenaŭ en la pariza-budapeŝta prononco de PAG. Ili do havas ekvivalenton en Esperanto. (*í*, *ó*, *ó*, *ú*, *ë*) kiel *De òh*, *ò*, *ùh*, (*ë*) kiel en *Fr le*). Simile, de la diftongoj, (*àŭ*, *éŭ*, *áj*, *èj*, *ój*, *új*)* havas ekvivalenton en Esperanto, dum (*iŭ*, *uŭ*, *oŭ*) (skribataj *ieuw*, *uw*, *ui*) tion ne havas. (La sono (*òŭ*) tamen, laŭ mi, pli ol (*éŭ*) similas al Esperanto-eŭ!) (Rim.: En la ortografio de loknomoj persistas iuj malnovaj skribmanieroj: *oi* por *oo*, *ae* por *aa*, *ay/aij*, *oy/oij*, *ey/eij*, *uy/uij* Por *aai*, *ooi*, *ei*, *ui*, *c* por *k*, *gh* por *g*, *x* por *ks*, *y* por *i*, k.a.).

Inter la konsonantoj, troviĝas kelkaj grupoj da “malfacilaj”: la nederlanda *ch* ĉiam estas ĥ-sono (en la sudo tamen ofte prononcata kiel la germanlingva sono en *ich* [ç]; *g* estas “voĉhava ĥ” [[q]] (almenaŭ en la sudo, ĉar en la nordo ĝi plejofte estas simple ĥ); *w* en la nordo estas “senfrikcia v” (nederlandanoj uzas ĝin por Esperanto-v), en la sudo ĝi pli similas al ŭ; *v*, en la nordo estas pli frikcia ol *v*, kaj ofte simple *f*, dum en la sudo ĝi estas *v* kiel en *Fr*. La *g* tamen estas sentata kiel tre proksima al *g*: en fremdvortoj *g* prononciĝas kiel ĥ (ankaŭ en: *Wolga*, *Riga*, *Afganistan*, k.t.p.). Eĉ ekzistas flandra lernolibro de Esperanto (*De Smet*), kiu asertas, ke Esperanto-*g* prononciĝas ĝuste kiel tia voĉhava ĥ! Alia konsonanto ne-ekzistanta en Esperanto estas *ng* [ŋ], kiel en *En: song*, *De: Ding*, sen fina *g*-sono, do. (Rim.: pri prononco de fremdvortoj ni ĉi tie ne okupiĝas).

2.2. Neparalelaĵoj inter skriboj de la nederlanda kaj Esperanto

Krom tio, ke ekzistas sonoj en la nederlanda lingvo, kiuj ne havas ekvivalenton en Esperanto, ekzistas jena komplikajo: La Esperanto-sono *i* nederlande skribiĝas *ie*, dum la nederlanda litero *i* indikas sonon neakcepteblan en Esperanto; la Esperanto-sono *u* nederlande skribiĝas *oe*, dum la nederlanda litero *u* indikas /*ò*/ aŭ /*ú*/; La Esperanto-sono *g* ne ekzistas en la nederlanda lingvo dum la nederlando litero *g* indikas (voĉan) ĥ-sonon.

Ĉar la ligo inter «duobla skribo» kaj prononco en la nederlanda lingvo estas nur tre nereкта, ne havas sencon transpreni duobligitajn signojn okaze de asimilado. La balbuta efiko en Esperanto nur ĝenus la rekonon de la nomoj.

* Fakte temas pri /*âð*, *éú*, *áě*, *èj*, *óŭj*/ kaj /*iŭ*, *uŭ*, *ëö*/, IFA: [po, ey, ae, ei, oi, ui] kaj [iy, yy, œφ]

Vojoj de asimilado

3.1. Problemoj kiuj ne estas problemoj

Nederlandanoj senĝene uzas la Esperanto-formojn: Hago, Utreĥto, Mastroĥto, Hilversumo, Groningeno, Antverpeno, Limburgo, Tilburgo, Amsterdamo, Roterdamo, k.t.p. Tiel jam tuj indikiĝas solvo de iuj “problemaĵoj”:

g, malgraŭ la prononco /*ĥ*/, fariĝas *g*; *ng* same restas.

ch, laŭ la prononco, fariĝas ĥ. (Kp. *Kavka* 1980).

u, malgraŭ la prononco /*ò*/ aŭ /*ü*/, fariĝas *u*.

i, malgraŭ la prononco /*i*/, fariĝas *i*.

v, malgraŭ la “norda” prononco (ofte /*f*/), fariĝas *v*.

w, malgraŭ la “suda” prononco (preskaŭ /*ŭ*/), ankaŭ fariĝas *v*.

e, eĉ se “ŝvao” /*ë*/, fariĝas *e*.

La diferenco inter “longaj” (“malvastaj”) kaj “mallongaj” (“vastaj”) vokaloj perdiĝas. (Pri /*ŭ*/ kaj /*ë*/, ktp.: Munĥeno², Nurenbergo², Vurtembergo². La eventuala transskribo “*i*” ne vere pli bone redonas la sonon, kaj pli difektas la vortbilon, ol “*u*” por (*ŭ*/).

3.2. Kun fina konsonanto, sen “ŝvao” en la fina silabo

Provizore kontentiĝante pri la sonŝanĝoj renkontitaj en 3.1., kaj esceptante la loknomojn, kiuj finiĝas per vokalo aŭ per silabo kun ŝvao, ni jam “produktas” jenajn nomojn (per unuobligo, aldono de -o):

Amsterdamo (PIV/PM), Roterdamo (PIV/PM), Utreĥto, Harlemono (PM), Tilburgo, Apeldorno, Zanstado, Arnhemo, Mastroĥto, Dordreĥto, Hilversumo, Amersforto, Delfto (PIV), Alkmaro, Amstelveno, Helmdono, Lelystado. Kaj ankaŭ (ne-loknomoj): Nederlando (PIV/PM), Holando², Zeland², Limburgo (PIV).

Senkome mi enkondukis “novan” regulon: fina konsonanto senvoĉiĝinta, revoĉiĝas. En la nederlanda lingvo, la *g* en *Tilburg* kaj *Limburg* estas senvoĉa (tiuregione: [ç]; kun aldono de vokalo ĝi voĉiĝas en la nederlanda, tiuregione, al voĉa ĥ [q], en Esperanto: *g*. Same, la *d* en *Zaanstad*, *Helmond*, *Lelystad* (la *y* venas de familia nomo, ĝi sonas kiel *ie*)-prononciĝas kiel *t*; kun aldono de vokalo ĝi en la nederlanda, kaj en Esperanto prononciĝas *d* nove kiel *d*. Same en: Nederlando, Holando.

(Rim.: Se ankaŭ la francoj kaj britoj uzos la formon -burgo por siaj loknomoj, videbliĝos iom pli da internacieco de tiaj loknomoj. Mi tamen supozas, ke la skandinavianoj preferos -burgo. Ankaŭ la poloj ne rezignos pri -borko, kredeble.

Tamen ne estus tiel mirige, se oni povus interkonsenti pri ia “internacia afikso” -burgo, ĉar la diversaj lingvoj sufiĉe libere utiligas sian formon por alilandaj lokoj. Sveda *Göteborg* nederlande nomiĝas *Gotenburg*, *Hamburg* en FRG nomiĝas *Hamborg* en Danlando kaj *Hambourg* en Francio la skota *Edinburgh* ankaŭ havas nacilingvajn formojn je *-bourg*, *-burg* aŭ *-borg*, eĉ se homoj “kiuj scias pli bone” diras ion similan al *Edinbara*).

3.3. Finaj vokaloj

Kavka-Pumpr (1972) proponas, ĉiam simple anstataŭigi la finan vokalon per la Esperanto-finaĵo. Ili mem tamen faras escepton por unusilabaj nomoj. Ĉar ili ankaŭ proponas, rekonebligi komunajn vortelementojn, ni konkludu, ke se la lasta silabo fakte estas unusilaba vorto finiĝanta per vokalo, tiu vokalo principe restu.

Se ni procedus alie, la asimilaĵo tro rapide fariĝus nerekonebla, laŭvide kaj laŭaŭde.

Kompreneble nenio kontraŭas la anstataŭigon de fina vokalo (kaj eĉ pli), se temas pri gramatika finaĵo (ekzemple genro-indika vokalo) en la koncerna lingvo. Gramatikajn finaĵojn oni povas anstataŭigi per alilingvaj gramatikaj finaĵoj, ĉar ili estas teknikaj helpiloj de la ĉirkaŭanta lingvaĵo.

La finaj vokaloj, kiuj ne apartenas al unusilaba konsistiga vorto, kaj tiuj, kiuj ne plu estas rekoneblaj kiel tiaj, prezentas plue problemon. Ĉar rekoneblo de la nomo estas grava postulo por asimilaĵo, mi proponas ĉiam kontroli, kia estas la efiko de eventuala forlaso al la rekoneblo. Supozeble, la forigo de tia fina vokalo pleje ĝenos la rekoneblon, se temas pri akcentita aŭ (iulingve) longa, dum la vorto ne estas tiel longa, ke la nomo tamen restas rekonebla.

3.3.1. Fina -o. Plej senproblema? Ĝuste problemo!

Kie ŝajnus esti neniu problemo, nome se temas pri loknomoj kiuj aspektas “plej plene esperantaj”, la simpleco perfidas. *Almelo*, *Ermelo*, *Venlo* k.s. aspektas kiel pure esperantaj vortoj, sed kiam oni adjektivigas ilin, ili fariĝas praktike aŭde nerekoneblaj: almela, ermela, venla - kaj vaterla (laŭ PIV: Vaterlo - kie Napoleono trovis sian Vaterlon...). Temas pri loknomoj finiĝantaj per *-lo* (*-loo*). Tio ne estas sensenca finaĵo, sed malnova vorto por arbaro. En *Almelo*, *Ermelo*, *Waterloo*, ĉefa akcento estas sur la unua, kaj duagrada akcento sur la lasta silabo. Forigo de la *o* en adjektivoj, kune kun la translokado de la akcento al la ne-akcentebla ŝvao, praktike ruinigas la nomon. Sola solvo ŝajnas esti nur la konservo de la *-o*: Almelo, Ermelo,

Venloo, Waterloo; adjektive: almelo, ermelo, venlo, vaterlo. Tia -oo ne tro ĝenas: jam ekzistas ja en Esperanto: troo, heroo. Tamen oni konsideru, ke Esperanto, transprenante vorton el nacilingvo, ne zorgas pri ties originala akcento. Do Vaterlo k.t.p..

3.3.2. Fina -e

Pluraj loknomoj finiĝas je *-e* (ŝvao). Ĝi simple anstataŭiĝu per la Esperanto-finaĵo: Zvolo, Gilzo, Hemstedeo, Kerkrado, Ralto. Nur ĉe la plej mallongaj la efiko estas iom minimumiga: Edo, Epo. Tamen, Edeo, Epeo ne pli rekonebligis la nomojn.

En *Enschede*, la fina *e* nederlande ne estas ŝvao (germane tamen ĝi estas). Ĉu tio estas sufiĉe da kialo por diri Enshedeo? Laŭ mi ne; la adjektivo enŝeda sufiĉe taŭge reprezentas la nomon. Do tamen, ankaŭ pro “reguleco”: Enŝedo. (La germana prononco iom apogas tion).

3.3.3. Fina -a

Jen problemo. La du plej gravaj ekzemploj estas *Breda* (kun akcento sur la lasta silabo) kaj *Gouda* (kun akcento sur la unua silabo). La fromaĝo el *Gouda* sendube estas gaŭda fromaĝo, sed mi imagas jam la kontraŭstaron de la loĝantoj de *Breda*, se ni nomus ilin bredaj. La nederlandaj adjektivoj estas respektive *Gouds(e)* kaj *Bredaas/Bredase*. Malgraŭ tiu “nereguleco” kaj la neeblo por ne-tiulingvanoj por formi asimilaĵojn, mi inklinas al Bredao. *Pekela* (kun akcento sur la unua silabo) tamen povas fariĝi Pekelo. Denove ni konsideru, ke Zamenhof el la finsilabe akcentita *Moskva* faris Moskvon. Ŝajne, la originala akcento vere ne gravas...

3.3.4. Fina -ie

Overschie kaj *Middelie* devenas de rivernomoj *Schie* kaj *Lie(de)*. Fakte temas pri “Trans-Ŝio” kaj “Mez-Lio”. Do: Overshio kaj Midelio. Ni sekure povas diri, ke fina *-ie*, neniam estas malgrava, ĝi do ĉiam restu kiel i.

3.4. Gramatikaj finaĵoj: transpreni aŭ ne?

Mi opinias, ke “nuntempaj” gramatikaj finaĵoj havas sian funkcion en la ĉirkaŭstaranta lingvaĵo. Se tiu ŝanĝiĝas, oni povas libere anstataŭigi ilin per gramatikaj finaĵoj de la nova ĉirkaŭstaranta lingvo. Tamen, se temas pri ne-plu-aktualaj gramatikaj finaĵoj, kiuj ne havas rolon en la nuntempa lingvo -sed tamen restis, la demando estas alia. Dependas de tio, ĉu oni “sentas” tian finaĵon kiel parton de la nomo, aŭ ne.

(Rim.: Kvankam la finaĵoj *-en* kaj *-er* sugestas ekz. pluralon, ili ĝenerale ne havas/is tiun signifon!)

3.4.1. Nomoj je *-en*

Sufiĉe multe da nederlandaj loknomoj finiĝas je *-en*. Foje tio estas malnova gramatika finaĵo, foje ĝi devenas de *-na* aŭ simila finaĵo, foje ĝi eĉ devenas de *-heem* (kp. hejmo). La rezulto estas, ke dum konstruado de nederlandaj adjektivoj, la *-en* foje restas kaj foje forfalas. Estas do malfacile konstati, ĉu ĝi apartenas al la nomo, kaj ĉu en Esperanto ĝi estas konservenda.

Alilingvaj ekzemploj indikas forigon. *Antwerpen* (Fr: *Anvers*, En: *Antwerp*, Pl: *Antwerpia*) (PIV/PM: Antverpeno²); *Leiden* (Fr: *Leyde*, En: *Leyden*, Pl: *Lejda*) (PIV: Lejdeno); *Groningen* (Fr: *Groningue*) (laŭ g-aj esperantistoj: Groningeno, vidu UEA-JL 1982); *Vlissingen* (Fr: *Flessingue*, En: *Flushing*); *Nijmegen* (Fr: *Nimègue*) (PIV: Nimego).

Kelkaj nederlandaj adjektivoj:

a. kun konservo de *-en*: *Eindhoven*, *Alphens*, *Brummens*, *Burens*, *Deldens*, *Dierens*, *Harener*...

b. kun forfalo de *-en*: *Asser*, *Beiler*, *Bodegraafs*, *Bunschoter*, *Coevorder*, *Dalfser*, *Diemer*, *Emmer*, *Enkhuizer*, *Groninger*...

Kion fari? Ĉu ĉiufoje konsulti lokanon, kaj decidi pri alfena, brumena, burena, deldena,... sed asa, bejla, bodegrava, bunŝota, kuvorda, dalfsa...? Kaj kion fari pri *Drachten*, kies adjektivo estas *Drachtster*!

Ŝajnas al mi, ke por la pli longaj nomoj, la forfalo de *-en* ne ĝenas la rekonoblon, sed ĉu iu rekonos la lokon el: asa? ema? Supozeble ni sekvu la ekzemplon de Groningeno, kaj ĉie lasu la *-en*: asena, bejlana, bodegravena, bunŝotena, kuvordena, dalfsena, draĥtena. La PIV-formon Nimego ni tiam konsideru kiel escepton, bazitan je la franca.

3.4.1. Nomoj je *-er*

Kutime tiuj havas en la nederlanda lingvo adjektivon je *-jers*. Tiam do ni ĉiuokaze konservu *-er*: Doldero, Helderero (pri forfalo de la artikolo, vidu ĉe 3.6.). *Deventer* tamen havas kiel adjektivon *Deventer* sed mi proponas, ke tio ne ĝenu nin en uzado de Deventero. Kp.: poldero.

3.4. Individuaj sonoj

3.5.1. *-ie-*

Ĉar la skribo *ie* estas "la" maniero por indiki *i*-sonon en la nederlanda lingvo (nur en fremdvortoj oni uzas *i* pro */i/*, ĝi estus same traktata kiel la

aliaj digramoj: ĝi fariĝus simple *i*. La ekzemplo Vieno ne estas trafa argumento por skribo *ie*. Unualoke, en sudgermana prononco la *ie* ofte estas diftongo, kaj en nederlanda neniam. Dualoke, tia artifiko havas sencon por konebligi unusilaban loknomon*, sed ne por aliaj. Tial, mi akceptus Tielo por *Tiel*, sed ne Ŝhiedamo por *Schiedam* aŭ Hierdeno por *Hierden*. Preferindaj ŝajnas al mi: Ŝhidamo kaj Hirdeno. Kp.: Vieno², sed Liŝtenŝtejnjo. Ke laŭ etimologio, *ie* ofte devenas de */io/ /iu/* ne gravas, ĝi ne diftongiĝas en la nederlanda prononco. (La origina */i/* kutime fariĝis *ij*, kiun ni traktu poste).

3.5.2. *-ij-*

La du literoj *ij*, ofte konsiderataj kiel unu litero *ij*, kaj ĉiuokaze vortkomence ambaŭ majuskligendaj (*IJmuiden*), estas stranga fenomeno en la nederlanda lingvo. En nederlandaj telefonlibroj serĉu ĝin inter *y*, en enciklopedioj post aŭ antaŭ *y*, en vortaroj sub *i*, antaŭ *ik*. Ĝia prononco estas */èj/*, do sama kiel tiu de *ei*, sed en dialektoj ĝi ofte sonas */i/*, laŭ ĝia deveno. En *Zwijndrecht*, *Zwijnd* identas kun la vorto *zwin*, en *Nijmegen* kaj *Nijkerk*, k.s., *Nij* = *Nieuw* (-nova), dum la finaĵo *-wijk* ekvivalentas la angla *-wich* kaj la skandinavia *-vig*. Krome, *Braunschweig* (FRG) (Brunsviko²) nomiĝas nederlande: *Brunswijk*, *Schleswig* (FRG) (PIV: Ŝlesvigo): *Sleeswijk*. Parizo: *Parijs*, Berlino: *Berlijn*, Torino: *Turijn*.

Se ni uzus *ej* por transskribi *ij* laŭ la prononco, oni ne plu sukcesus trovi la nomon en registro. Tio tamen ne estas tro peza argumento, ĉar jam okazas sufiĉe da ŝanĝoj. Eble decida argumento estas, ke pluraj nederlandanoj diras mem: *Zwindrecht*, *Nimwegen*, *Niekark*, kaj do almenaŭ ili rekonos: Nimego (PIV), Zvindreĥto, Nikerko, Rieno (*Rijen*), Katviko kaj pluraj aliaj je *-viko*, Delfzilo, Riseno. Pri Viĥeno (*Whijchen*) devus ekzisti malpli da problemoj, ĉar ŝajne la sola akceptebla prononco de ĝi estas */viĉen/*. La Risvikanoj (*Rijswijk*) eble iom miros.

Se, tamen, ni eliras de la "spontanee" formiĝantaj asimilaĵoj, do de tio, kio okazas, kiam oni provas diri ekzemple *Rijswijk*-a, ni necese prenu *ej* kiel transskribon de *ij*, ĉar sendube tiuj "spontaneaj" formaĵoj estas: Rejsvejko, Delfzejlo, Rejeno, Katvejko, Nejkkerko, Rejseno!

Malfacila elekto. Tamen, la formoj kun *i* certe sonas "pli esperante".

* Same oni povas argumenti por duobla redono de la "longaj" vokaloj *aa*, *ee*, k.s. en unusilabaj nomoj, se bezonate. En geologio oni jam parolas pri eema kaj vaala interglacialoj, supozante la nomojn Eemo kaj Vaalo por la nederlandaj riveroj *Eem* kaj *Waal*. (Maas tamen tradicie nomiĝas Mozo). Certe, por rivero, la nomo "Valo" estus tre maltaŭga...

(Kp.: digo = *dijk*, pipo = *pijp*, vino = *wijn*, listo = *lijst*, biblio = *bijbel*).

3.5.3. -eu-

Laŭ la prononco /*ö*/, antaŭ *r*: longa /*õ*/, ĝi identas kun la germana *ö* kaj skandinavia *ö/ø* - kaj kun la franca *eu*... Se por germanaj kaj skandinaviaj nomoj defendeblas transskribo per *o* (*Kavka 1981*), tia redono por la franca kaj nederlanda ne estus akceptebla. Plej akceptebla solvo verŝajne estas, adapti la grafismon al eŭ: Deŭrno, Leŭro.

3.5.4. -oe-

Tio prononciĝas /*ú*/, kaj mi ne povas helpi, ke la povra Esperanto-litero u ricevas tiom da funkcioj, sed krom /*õ*/ kaj /*ú*/ ĝi indiku ankaŭ sian propran sonon. Serĉado en registroj jes ja malfaciliĝas per tio. Zutermero, Dutinĥemo, Guso, Hunsbruko, Rurmondo, Susto, Vurdeno. (Kp. inverse: *Boedapest*, *Boekarest*, *Oeral*, k.t.p.).

3.5.5. -ui-

Tio prononciĝas /*õŭ*/ kaj devenas de /*ú*/ . La sono estas tre simila al Esperanto eŭ. Tial oni renkontas formojn kiel Meŭdeno, Heŭzeno. Prave, en la zanlanda regiono (do ĉirkaŭ la urbo Zandamo, kiu nun fariĝis centro de komunumo Zanstado = *Zaan*-urbo), la lokuloj — eĉ mi iam, kvankam “importita” — havis grandajn problemojn kun la distingo inter *ui* kaj *eu*. Do eble ne estus tro stranga solvo, uzi eŭ por ambaŭ. La alternativo estas denove u: Mudeno, Huzeno. Mi ne kuraĝas elekti. Do aliaj elprovu, ĉu estu Imeŭdeno aŭ Imudeno. (Mi ne mirus, se “oni” preferus la solvon “Ejmeŭdeno”.)

Mudeno k.s. sonas tamen “pli esperante”.

(Kp.: bruna = *bruin*, duno = *duin*, fluto = *fluit*, muso = *muis*, luko = *luik*.)

3.5.6. -au/auw/ou/ouw-

La diftongoj *au(w)* kaj *ou(w)*, malgraŭ la malsama etimologio, prononciĝas idente: /*àŭ*/ . Kvankam la tradicia transskribo en *IFA* estas [ɔu] (ĝenerale tamen kun tre malferma [ɔ!]), ili ne estas transskribeblaj en Esperanto per “oŭ”. (Tio indikus iun regionan prononcon de /*ó*/.) Laŭ mi, la transskribo per “oŭ” estas allasebla en Esperanto nur por “duonasimilitaj” formoj de vortoj el lingvoj kiuj posedas tiun sonon. Kontraste al uzantoj de “poŭpo”, mi ne opinias, ke vorto kun oŭ estas Esperanto-vorto. Se oni malakceptus aŭ por *ou(w)*, la etimologia alternativaĵo estus “ol”.

Sola solvo, laŭ mi: ambaŭ estus aŭ: Gaŭdo (*Gouda*), Osterhaŭto (*Oosterhout*), Venvaŭdeno (*Veenwoouden*), Aŭgustinusgao (*Augustinusga*), Gaŭo

(*Gauw*), Graŭo (*Grouw*), Haŭlerviko/vejko (*Haulerwijk*).

3.5.7. Restaĵoj

La diftongoj *aai* (*ay*), *ooi* (*oy*), *oei* estu aj, oj, uj.

La diftongoj *eeuw*, *ieuw* estu eŭ, iŭ.

Rilate al iŭ, temas pri “duonasimilaĵo”, ĉar “iŭ” en la nederlanda lingvo ekzistas, sed ne en Esperanto. Ĝi aperas tamen preskaŭ esklude en *Nieuw*-, kiun oni, okaze de plena asimilado, povas ŝanĝi al Nov-.

3.6. Forfalo de la artikolo

Laŭ la ekzemplo de Hago (PIV/PM) kaj de la nederlandaj adjektivoj, la artikolo de la loknomo simple forfalas: *Den Haag*: Hago, *Den Helder*: Heldero, *Den Burg*: Burgo, *De Bilt* kaj *Het Bildt*: Bilito.

En *'s-Gravenhage* (= Den Haag) kaj *'s-Hertogenbosch* *'s* estas genitiva artikolo: la arbar(et)o de la grafo, la arbaro de la duko, france: *Bois-le-Duc*. Ankaŭ *'s-Hertogenbos* havas paralelan formon *Den Bos(ch)*, kaj la adjektivoj estas *Haags* kaj *Bos(ch)* (tiu *ch* ne prononciĝas). Do, apud Hago: Boso (?).

3.7. Tradukotaj partoj

Kiel montras ankaŭ *Kavka-Pumpr*, la adjektivoj: *Nieuw*, *Oud*, *Hoog*, *Laag* k.t.p. tradukiĝu laŭ la signifo: Nova, Malnova, Alta, Malalta. Sed ankaŭ validas: se ili skribiĝas aparte. Mi donas pli da ŝancoj al Niŭerkerko (*Nieuwerkerk*) ol al Novkerko - ĉar tiam oni estus konsekvenca, kaj diru Novkerko aŭ Novpreĝejo.

Niŭerkerko ĉe Iselo (Ejselo) (*Nieuwerkerk aan de IJssel*), Bergeno ĉe Maro (*Bergen aan Zee*): laŭ “Bulonjo ĉe Maro”. Sed: en Nord-Holando troviĝas la duo: *Bergen aan Zee*, *Bergen-Binnen*, ĉu taŭgas: Bergeno ĉe Maro kaj Bergeno-Interna? Norde de Antverpeno, en Nederlando, troviĝas *Bergen op Zoom* - ĉu taŭgus Bergeno sur Zomo aŭ Bergeno sur Rando (temas pri la rando de la monteta regiono)?

Kaj ĉiam restas la duboj, ĉu traduki fizik-geografiaĵon ankaŭ en loknomo. Ni ĉiuj konsentus, ke *Broek in Waterland* estu nek Pantalono en Akvolando (ĉar *broek* tie ne signifas tion), nek Marĉo en Akvolando (kvankam tion tio signifas), sed ĉu: Bruko en Akvolando aŭ Bruko en Vaterlando? La komunumon *Noordoostpolder* (kvankam ne ekzistas loko kun tiu nomo: loĝataj lokoj estas Emelordo, Markneso, Krejlo, Banto, Tolebeko, k.t.p.) ni eble nomu Nordostpoldero - sed la polderon mem (al kiu nun ankaŭ apartenas la eks-insulo Urko) ni ja nomu Nord-Orienta Poldero... Sed ĉu oni no-

mu la provizoran administran unuon, kie niaj gefiloj naskiĝis: Zeŭdelejkkeesjsemerpolderso/Zudelikeisemerpolderso? Ni nomis ĝin *ZIJP*, kaj *Zuidelijke IJsselmeerpolders* signifas: Sudaj Isel/Ejsel-lagaj Polderoj -do eble por tiu okazo ni diru ZIPo aŭ ZEJPO? Sed ne zorgu, post kelkaj jaroj tiu Zipo ne plu ekzistos. (Zipo/Zeipo cetere estas ankaŭ la komunumo *Zijpe* en Nord-Holando kaj la vilaĝo *Zijpe* en Zelando). En la pasportoj de niaj infanoj tamen tutvive staros tiu longa formo...

La frisoj trovu solvon por siaj dulingvaj loknomoj - kaj por la tie sufiĉe oftaj komunumo-nomoj neegalaj al loknomo. Eble *Wonseradeel* nomiĝu Vonsio, Vonserio aŭ Vonsenujo? Mi ne kompetentas.

4. Komparo de la rezultoj

Jen la nederlandaj komunumoj, kiuj je 1980.01.01 havis pli ol 50.000 loĝantojn, en "rigore" asimilita kaj originala formoj: Amsterdamo (*Amsterdam*) (*PIV/PM*), Roterdamo (*Rotterdam*) (*PIV/PM*), Hago (*'s-Gravenhage/Den Haag*) (*PIV/PM*), Utreĥto (*Utrecht*), Eindhoveno (*Eindhoven*), Groningeno (*Groningen*), Harlemo (*Haarlem*) (*PM*), Tilburgo (*Tilburg*), Nimego (*Nijmegen*) (*PIV*), Enŝhedo (*Enschede*), Apeldorno (*Apeldoorn*), Zanstado (*Zaanstad*), Arnĥemo (*Arnhem*), Bred(a)o (*Breda*), Maŝtriĥto (*Maasricht*), Dordreĥto (*Dordrecht*), Lejdeno (*Leiden*) (*PIV*), Hilversumo (*Hilversum*), Emeno (*Emmen*), Amersforto (*Amersfoort*), Boso (*'s-Hertogenbosch/Den Bosch*), Leŭardeno (*Leeuwarden*), Delfto (*Delft*) (*PIV*), Edo (*Ede*), Zvolo (*Zwolle*), Vlardingeno (*Vlaardingen*), Harlemermero (*Haarlemmermeer*), Hengel(o)o (*Hengelo*), Ŝhidamo (*Schiedam*), Alkmaro (*Alkmaar*), Herleno (*Heerlen*), Amstelveno (*Amstelveen*), Deventero (*Deventer*), Zutermero (*Zoetermeer*), Almel(o)o (*Almelo*), Venl(o)o (*Venlo*), Heldero (*Den Helder*), Zejsto (*Zeist*), Velseno (*Velsen*), Gaŭdo (*Gouda*), Helmondo (*Helmond*), Rozendalo kaj Nispeno (*Roosendaal en Nispen*) (ĉi tie *s = z*), Risviko (*Rijswijk*), Alfeno ĉe Rejno (*Alphen aan de Rijn*) (*ph = f*).

El tiuj, Nimego aspektus Nimegeno, se la ĉi-antaŭaj "reguloj" estus aplikitaj.

5. Limoj de uzo

Same kiel ekzistas certaj cirkonstancoj, en kiuj la uzo de asimilaĵoj estas necesa, ankaŭ ekzistas cirkonstancoj, en kiuj ili estas kontraŭefikaj. Nome, kiam ili tute ne apartenas al la teksto mem, do kiam ili ne benozas agordiĝi kun la ĉirkaŭteksto. Tiaj okazoj estas ekz.: mencio de naskiĝloko en iu ate-

sto (tiam oni uzu, se eble, la nomon validantan tiuloke kaj tiutempe), kaj urbonomoj en leteradreso (tiam oni uzu, se eble, la nomon validantan tiulande kaj nuntempe — ĉar tiu informo ja estas por la tiulanda poŝto), sed la landonomon en la leteradreso oni skribu laŭ la lingvo de la sendo-loko (ĉar ĝin komprenu la tiea poŝto). Tamen ĉi-okaze la Esperanto-landnomo ne tre ĝenas. Krome, oni ebligu ĉiam, ke la leganto povu serĉi la loknomon en maparo, almenaŭ en latinlitera maparo, se ne temas pri pure literatura teksto, aŭ pri asimilaĵo trovebla en vortaroj. Piednoto aŭ interkrampa mencio estas taŭga rimedo por tio.

Por la problemoj de (i.a. lok-)nomoj en eventuala permaŝina tradukado, vidu mian "Kelkaj pensoj" (*Pilger* 1983).

6. Praktika regularo

Ĉi tiu regularo taŭgas ankaŭ por doni, inter krampoj, bonan impreson pri nederlandaj nomoj, se oni preferas utiligi la originalajn formojn en la teksto. Tiam evt. transsaltu 2,3,11,12 kaj uzu 6B.

"PRAKTIKA" REGULARO (restas esceptoj)

1. Komencu de "moderna" ortografio (*oi* → *oo*, *oy* → *ooi*, *ae* → *aa*, *ei* → *ei*, *c* → *k*, k.t.p.)
2. Forigu la artikolon (*De*, *Den*, *Het*, *'t*, *'s*-, sed ne *Ter*)
3. Forigu finan *-e* (sed ne *-ee*, *-ie*, *-oe*, kaj ĝenerala ne aliajn vokalojn)
4. *au/auw/ou/ouw* → aŭ, *eeuw* → eŭ, *ieuw* → iŭ
5. *ch* → ĥ, *w* → v
- 6A ("drasta Esperantigo") *ui* → u, *ij* → i
- 6B ("spontanea Esperantigo") *ui* → eŭ, *ij* → ej
7. Unuobligu duoblaĵojn (vokalojn kaj konsonantojn)
8. *ie* → i (eventuale en unusilabaĵoj: *ie* → ie)
9. *oe* → u, *eu* → eŭ
10. vokalo + *i* → vokalo + j
11. Eventuale: fina *f* → v, fina *s* → z, se tiu ŝanĝo okazas en nederlanda nomo antaŭ vokalo.
12. Radiko preta; aldonu finaĵon bezonantan.

7. Referitaĵoj

De Smet, W.M.A. (1982): Esperanto snel assimileren. - De Nederlanden. Antwerpen. ISBN 90 6583 028 6.

Kavka, J., Pumpr, T. (1972): Poŝatlaso de la mondo, kontribuo al geografia nomenklaturon en Esperanto. - Scienca Revuo, 23, 3-27. Beograd.

Kavka, J. (1978): Esperantigo de la ĉeĥoslovakaj loknomoj. - Scienca Revuo, 119-128. Ĉapeko.
Kavka, J. (1980): La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. - Kolekto de la seminariaj referaĵoj: Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko, 93-100, Ŭsti nad Labem.

Kavka, J. (1981): Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantiĝon. - Kolekto de la referaĵoj de konferenco Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko. 1,6-14. Ŭilina.

PAG: *Kalocsay, L., Waringhien, G. (1982): Plena analiza gramatiko de Esperanto. Kvara, tralaborita, eldono. - U.E.A. Rotterdam. ISBN 92 9017 022 D. [fuŝaj prononc-indikoj: p. 39-49.]*

Pilger, W.F. (1983): Kelkaj pensoj pri Esperanto kiel maŝintraduka ponto-lingvo. - Vulpo-Libro. Lelystad. ISBN 90 70074 33 8.

PIV: *Plena ilustrita vortaro de Esperanto (1970). Ĉefred. G. Waringhien. - Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris.*

PM: *Poŝatlaso de la mondo (1971). Kartografie n.p. Praha.*

Seppik, H. (1974): Propraj nomoj en Esperanto. - Scienca Revuo, 73-80. Beograd.

UEA-JL: *Jarlibro 1982. - Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam. ISSN 0075-3491.*

8. Konsultitaĵoj (i.a.):

Statistisch zakbosk 1980. Centraal Bureau voor de Statistiek. - Staatsuitgeverij. 's-Gravenhage. ISBN 90 12 03021 B. (tab. 13 por komunumo-nomoj kaj loĝanto-nombro)

Handboek van de nederlandse pers en publiciteit 81/oktober (1981). 56e uitgave. - Nijgh Periodieken. Schiedam. (por adjektivoj de loknomoj en gazetaj titoloj)

Viries, J. De (1958): Etymologisch woordenboek. - Spectrum. Utrecht/Antwerpen. ISBN 90 274 4812 4. (por etimologio de loknomoj)

Problemer bij het aanpassen van nederlands(talig)e plaatsnamen aan het Esperanto

In verschillende — literaire, toeristische, wetenschappelijke — teksten bestaat de behoefte aan bijvoorbeeld bijvoeglijke naamwoorden van plaatsnamen. De meeste Edammer kaas komt immers niet uit Edam, een Leidse fles is niet een fles uit Leiden, en Maastrichtse kalksteen ligt ook bij Valkenburg.

In het Esperanto bestaat dan, evenals in andere talen, de noodzaak om de naam te assimileren. Vormen als "Maastricht-a", "Leiden-a" kunnen optisch voldoende zijn, maar zij zijn onuitspreekbaar. Niet allen omdat de kennis van de Nederlandse uitspraak en spelling ontbreekt, maar ook omdat bijv. de verschoven klemtoon de oorspronkelijke uitspraak vaak eenvoudigweg onmogelijk maakt. De enige oplossing is dan: assimilatie, aanpassing aan het klanksysteem en de spelling van het Esperanto.

Om verschillende redenen bestaat er een weerstand tegen assimilatie van (plaats)namen. Gewoonlijk niet voor wat betreft die uit vreemde landen, maar vooral voor wat de namen uit het eigen land betreft. De tegenstand is des te groter, naarmate de geassimileerde vorm afwijkt van de oorspronkelijke. Toch moet men rekening houden met de behoeften van mensen uit andere landen die ook over Nederlandse en Vlaamse specialiteiten willen praten!

Dit artikel geeft enkele suggesties betreffende de aanpassing van nederlandstalige plaatsnamen aan het Esperanto, voor de gevallen waarin hiertoe de noodzaak bestaat. Voor enkele elementen (ui, ij) worden twee verschillende wegen aangegeven: die van de "spontane" assimilaties, en één, die meer rekening houdt met zowel het klanksysteem van het Esperanto als met de etymologische achtergrond van de namen.

La esenca karaktero de la propraj nomoj

Senca kategorio kaj (inter)nacia formo

*Manuel Gomes (Portugalio)**

1. Enkonduko

Tiu ĉi studo estas kvazaŭ daŭrigo de alia preskaŭ samtitola (*Gomes 1975*). La tempospaco inter la datoj servis por pliprecizigi iujn atingitajn nociojn, tiam nur prezentataj.

Fakte, kvankam mi tiam jam konsciis pri tio, kio la propraj nomoj ne estas, mi tamen ankoraŭ ne konsciis tiom nete pri tio, kio ili vere estas.

Do, kaj ĝis ia punkto, la referencita artikolo estas kvazaŭ la taŭga enkonduko por la ĉi-nuna, kie estas dediĉita pli detala spaco al la "esceptoj" (aŭ "subreguloj").

2. Plano por tiu ĉi studo

En la unua parto oni studos tion, kio estas la propraj nomoj en la limoj de la sencosignifa gramatika nomenklaturato.

En la dua parto oni studos la formojn de la propraj nomoj ekde iliaj (inter)naciaj skribaspektoj, kaj pri tiuj oni klopodas montri la eltroveblajn internaciajn normojn, kiujn same la naciaj lingvoj pli-malpli respektas spite iliajn lim-konceptojn pri la "universaleco".

Fine, en konkluda parto, estas prezentataj iuj konsideroj pri pli larĝa nocio de asimilado, je adapto kaj adopto de la nom-formoj.

3. Pri tio, kio sence la propraj nomoj estas

3.1. La propra nomo estas "titolece distinga" (kaŭzo mem por la uzo de komenca majusklo)

Tio signifas, ke la propra nomo estas aldone kaj titolece metita al unu komuna nomo inter variaj, por ĝin nome distingi el ĉiuj aliaj samspecie komunaj. La ĝenerala uzo de la komenca majusklo, kiu ne povas esti neata aŭ nuligata, eĉ se iuj verkistoj ne ĝin uzas, estas pruvo pri la titoleca distingo.

* 9970 SANTA CRUZ, Flores, Aĉores